

Johann Wolfgang von Goethe,

Ŝanĝiĝo

tradukita de Manfredo Ratislavo

En akvo sur ŝtonoj mi estas kuŝanta,
Etendas la brakojn al l' ondo venanta,
Amume ĝi prenas la bruston de mi.
Facile forfluas la ondo unua,
Alvenas, karesas min same la dua,
Kaj ĝojon sentigas al mi tio ĉi.

Malĝoje kaj vane vi estas ŝlifanta
La horojn valorajn de l' vivo fluanta,
Ĉar vin amatega forlasis knabin'.
Kiŝiĝas tre dolĉe la lipo de l' dua,
Sed tute ne kiel la lip' de l' unua;
Ne turnos la tempoj antaŭaj ja sin!²

*Traduko de la Germana poemo "Wechsel" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

MR-104-2 / Arg-266-536 (2004-09-07 09:50:35)

²aŭ: Returnos la tempoj antaŭaj ne sin!